TEA-BULTENO

23ª JARO - N° 154 **SEPTEMBRO - OKTOBRO** **N. 9-10/2020**

La evoluo, de la amebo ĝis la homo, ŝajnas esti progreso laŭ la filozofoj, sed ne klaras, ĉu la amebo samopinias.
Bertrand Russell, matematikisto, filozofo (1872 - 1970)

Kara Legantaro!

Estas finiĝonta la somero, la plej bela sezono de l' jaro precipe por ni esperantistoj ĉar, pro abundo de ĉieaj kaj ĉiudataj kongresoj, kunvenoj ks, ekzistas preskaŭ senlima ŝanco feriadi en plej diversaj mondlokoj kaj ĝui Esperantan amikecon. Sed - ho ve! - la kronviruso decidis alie por ni ĉiuj: malliberigis unue nin en la hejmoj, por poste devige nuligi ĉian renkontiĝon de la samideanaro. Iom konsolis la multaj virtualaj okazintaj eventoj, danke al kiuj ni kleriĝis, konatiĝis kun nekonatoj, kune lernis, vizitis Sciencan Kafejon, spektis koncertojn, babiladis... Tio ĉi reprezentis ia surogaton de la realo, sed kontentigis multajn, multegajn el ni, precipe tiujn kiuj ekz. unuafoje en sia vivo spertis '*partoprenon*' en sia unua Universala Kongreso. Ni danku pro tio la organizinton de tiu Monda-Fest', nome UEA-n, kiu sukcesis - per tre vigla laborado de teamo da aktivuloj - kunmeti riĉegan programon, ne nur rilate al la Virtuala Kongreso, sed ankaŭ al aliro al aliaj pluregaj, kalejdoskopaj eventoj tra Esperantujo, kiuj jam estis zorge planitaj kaj pretigitaj de la lokaj organizantoj, sed kiuj poste estis blokitaj pro la pandemio. Tial la tuta preparlaborado ne estis perdita, sed uzita por prezentado virtuala.

Do, tiu decido estis kaj estas plenakceptita de nia tuta komunumo, kiu pretece akceptis tian defion, tiom ke eĉ oni ekpensas, ĝin igi por ni ĉiuj parto de nia ordinara agado, ankaŭ kiam pandemio estos nura malgaja rememoro.

Certe ke tio ĉi absolute ne anstataŭos niajn ĉeestajn kongresojn, sed estos io plusa por ebligi konstantajn praktikadon kaj uzadon de nia bela interkomunika lingvo.

Ek do, ni ĉiuj, kune al novaj spertoj peresperantaj!

Via Redaktanto

VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO: REKONOJ AL MERITOPLENAJ ESPERANTISTOJ

Humphrey TONKIN: Honora Prezidanto de UEA



En la 1ª kunsido de la Ĝenerala Kunveno 2020 de la UEA-Komitato, oni elektis lin kiel Honoran Prezidanton de UEA.

Humphrey Tonkin (n. 1939, Kornvalo, Britio) estas sendube la plej influa kaj mult-flanka gvidanto de UEA en la lastaj kvindek jaroj. Prezidanto de la Asocio dum tri mandatoj kaj Estrarano dum tri pliaj, la du lastaj kiel Vicprezidanto (1980-83, 1983-86 kaj 2001-04), li ankaŭ ekster la Estraro grave kontribuis sur la kampoj de beletro, esploro kaj dokumentado kaj eksteraj rilatoj. Pli ol iu ajn alia, li estas ligita al la kreskanta tutmondiĝo de UEA en tiu periodo kaj al la plialtigo de la prestiĝo de Esperanto en la rondoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj estas specialisto pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado. Rekone al la unika valoro, vasteco kaj daŭremo de lia agado kadre de UEA, la Estraro proponis elekti lin Honora Prezidanto – posteno, kiun li verdire jam okupas en la koroj de la membraro.

Zlatko TIŠLJAR: Nova Honora Membro de UEA



Dum la samakomitatkunsido de UEA elektis Zlatko TIŠLJAR kiel Honoran Membron, sed bedaŭrinde la 8an de septembro li forpasis en Zagrebo, en la aĝo de 75 jaroj. Konata ankaŭ kiel Pajo, ekde 1962 li aktive kaj modele sin dediĉis al Esperanto, unue ĉirkaŭ Zagrebo kaj en la studentaj kaj junularaj rondoj, laborinte surkampe de TEJO, kaj ankoraŭ freŝe ĉi-jare, internacie, ĉefe en la eŭropa kontinento.

Multajn meritojn li havis: lian imponan biografion eblas koni ĉe la gazetara komuniko pri lia honora membriĝo - (uea.org/gk/898) aŭ ĉe la biografia artikolo en Vikipedio - (eo.wikipedia.org/wiki/Zlatko_Tišljar).

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA

Ŝoka anonco: forpaso de grava esperantisto

La 27an de julio ĉi-jara, atingis min mesaĝo de la kroata esperantisto Davor KLOBUČAR el Osijek, per kiu li estis min petinta publikigi en la TEA-Bulteno lian tradukon de "Naš čovo" (Nia ulĉjo), poeziaĵo de la konata poeto Silvije Strahimir Kranjčević (1865 – 1908).

En la n-ro 150 jan-febr 2020 jam aperis tiu verko, traduke de Vjekoslav MORANKIĆ, el Rijeka, kaj mi tuj ekŝatis la ideon, ke la legantoj havu eblon konatiĝi ankaŭ kun alia tradukstilo. Ne tuj mi respondis, kaj nur du tagojn poste jam tro malfruis, por informi Davor-on pri la akcepta decido. Kiel fulmo en serena ĉielo frapis min la informo pri lia subita morto, matene de la 29a de julio.

Plej ofte mi renkontis lin dum kunvenoj en Kroatio, sed pri lia famo de elstare kapabla esperantisto mi plenkonsciis. Li multon verkis, tradukis, ĉefe esploradis pri la historio de la kroata Esperanto-movado. Pere de elektronika poŝto foje ni havis kontaktojn rilate ĝuste tiun ĉi lian plej ŝatatan temon.



D. KLOBUČAR naskiĝis en Osijek, en la 1961a jaro. Li esperantistiĝis dum sia studado en la Studenta Esperanto-Klubo, Zagrebo. Post diplomiĝo li laboris kiel profesoro pri matematiko. Li aŭtoris "Matematika naša svagdašnja" ("Matematiko nia ĉiu-taga"-n), 730-paĝan verkon eldonitan en Zagrebo: ĝi estis interesa kombinaĵo pri popola matematiko, aprecata ne nur de studentoj, sed ankaŭ de instruistoj pri matematiko, de inĝenieroj kaj amatoroj. Sian vivon li pasigis en sia naskiĝurbo, kie li estis elektita prezidanto de la loka asocio "Liberiga Stelo", de li revivigita.

Vicprezidanto de la Kroata Esperanto-Ligo (2006-2020) kaj aktuala ĉefdelegito de UEA por Kroatio, ekde 2016, li multon verkis kaj tradukis:

- ★ SLAVONIA ARBARO (traduko, 1999);
- ★ ESPERANTSKI MOZAIK (2003);
- ★ RAKONTOJ SUB LA LITO" (traduko, 2004, Infanlibro de la jaro);
- ★ TRIOPO TERURA (traduko, 2006);
- ★ SAYONARA, JAPANIO (2008);
- ★ PET LATICA IZ OSIJEKA (2009) k.a.

Li esploradis la historion de Esperanto en Kroatio kaj ĉefe en Osijek, kie, en 2009, sekve de lia sukcesa iniciato, urba vojo ricevis la nomon de Esperanto-strato (*Esperantska ulica*).

Siajn historiajn esplorojn kaj la materialojn de osijekaj Esperanto-societoj li deponis ĉe la Dokumenta Esperanto-Centro, Đurđevac. Dum pluraj jaroj li redaktis ankaŭ la retejon de la Kroata Esperanto-Ligo.

Nome de la triestaj esperantistoj kortuŝe kaj amike mi esprimas niajn plej sincerajn kondolencojn al liaj estimataj familianoj kaj al la tuta kroata esperantistaro. Li ripozu en paco! ED

NIA ULĈJO[1]

Ekde kiam, almozulo, la manikoj vake pendis?
- Depost kiam, mastro mia, oni min al Lisa[2] sendis.

- Fulme tondris, kvazaŭ rompe la diabloj freneziĝis;
Mi surgrimpis fregat-pinton ĉar flag' nia implikiĝis.

- Tra fumego, tra kuglaro, ŝipopruo sturmis nia,
Mi eĉ nune vivon donus, por Tegetov[3], ridet' lia!

- En la alto dum mi staris, la scenejo estis jena:
Ne videblis plu la maro, tra l' nubaro fumoplena.

- De l' fortegaj ŝipoj estis akraj pintoj luliĝantaj
Kial ĝuste nia flago estu ne fiere flirtanta?

- En momento mi rimarkis: la italoj nin alpremas,
De la pint' insidas unu, flagon nian rabe prenas.

-"Vi ne faros, *galioto*[4]!" – mi protektis flagon nian.
Kaj de sube kugloj trafis korpon mian, korpon lian.

- Mi videtis ke li falis, sekvis tuje falo mia,
Dum la falo li kriegis: "*Ev-ev-iv-va I-ta-li-a*[5]".

- Pensis mi: "Ĉe ni itale ne kriaĉu, besta koto!
Amiraljo[6] nia vivu", mi ekkriis, "ho, *ĉozoto*[7]!"

- Kio pluis, mi ne scias; longe, longe estis tiel:
Ambaŭ manojn jen mi perdis kaj laŭeble vivas iel.

- Pensieto eta estas, bonuloj aldonas eron.
Meson por la *amiraljo* ĉiun pagas mi someron.

- Kaj mi preĝas por ke Dio niajn pekojn nun deprenu,
En la vivo plian jaron Li bonvole min plu tenu.

- Irus mi al Dipatrino, al Krasno[8] mi foje venos,
Ke mi tie humiliĝu, antaŭ ol min tombo prenos.

- Min doloras, ke mi diris, mastro, al la hom' baptita
Hundan vorton – Di' pardonu! - kiam estis li trafita.

- Sed mi diris! Ambaŭmane *amiraljon* mi defendis,
Kaj kriplulo senvalora ne ĉiam mi tia estis!

Esperantigis Davor Klobučar

Klarigoj pri iuj vortoj en la traduko:
1. Ulĉjo = Viro ordinara, simpla kaj ŝatata.
2. Lisa = Kroata insulo Vis en iuj kroataj dialektoj.
3. Tegetov = Wilhelm von Tegetthoff, aŭstria admiralo. Ĉe la insulo Vis (ĉi tie Lisa) venkis kontraŭ itala floto atakanta la insulon en 1866. Sub lia komando batalis multaj kroatoj, samkiel la heroo de ĉi poemo. La nomo →

El malfreŝa pano → BIERO!!!

Ĉu iu el vi jam eksperimentis mem fari per malfreŝa pano unu el la plej ŝatataj trinkaĵoj de la mondo? Se ne, jen ĉi tie sube, iom da historio kaj la recepto, nepre provinda!

La ideo uzi malfreŝan panon por produkti bieron venas de la antikva Egiptujo. Nuntempe, receptoj de nia prauloj, iom modernigitaj, estas proponitaj por reutiligi nevenditajn nutrovarojn kaj malŝpari energion. Grupo da junaj entreprenistoj el Piemonto, nord-okcidenta itala regiono, lanĉis projekton pri rondira ekonomio[1] por transformi la malfreŝan panon en bieron. Ekestis tiel biero *BIOVA*, laŭ la dialekta nomo de iu tipa piemonta panbulo.

La projekto sinergie agas kun panistoj kaj ĉefe superbazaroj, de kiuj akireblas la bezonata pano. La biero estas poste distribuata de la samaj bazaroj kaj, por ke la projekto estu korekta ankaŭ de la medioprotekta vidpunkto, la bierfarejo devas esti proksima al la panliverantoj. Klare temas pri ampleksa antaŭprepara laboro, por akordiĝi kun ĉiuj partneroj.

Kelkaj teknikaj detaloj: en la finfarita biero pano estas la baza komponanto: fakte ĝia ĉesto egalas al 30 procentoj. Kompreneble ne ĉiu tipo de pano taŭgas por ties prilaborado, do devas esti farata atenta elektado. La fina produktaĵo estas du diversaj helaj bieroj je mez-malalta gradeco.

Tiu ĉi estas la eksperimento farita en Italio, sed jam multaj estas la landoj, ĉu eŭropaj ĉu alikontinentaj kiuj sin ĵetis en tiun ĉi aventuron, kiu havas ankaŭ pozitivan celon, nome la kontraŭstaron al forĵetado de manĝovaroj, malŝparado de energio, kaj sinergia kunlaborado kun diverstipaj entreprenoj.

150 kg PANO REUTILIGITA = 2500 L DA BIERO

Kiel dirite ĉekomence, biero ekzistas jam de jarmiloj kaj preskaŭ ĉie.

En Afriko biero estas farita el milio; en Sudameriko el maizo aŭ aliaj cerealoj - la nomo de tiu fermentita trinkaĵo estas chicha [ĉiĉa], kies etimo, plej probable, devenas el la lingvo de Majaoj. Kaj en Azio? Ĉu iam ajn oni trinkis bieron, krom la nunajn enportitajn? Jen ega surprizo: en Ĉinio oni tostis per biero jam de la ŝtonepoko! Arkeologoj malkovris terakotajn restaĵojn sur kiuj estis spuroj el milio, el Larmoj de Jiobo, konata ankaŭ kiel *koix lacrymajobi* aŭ *nyeli*, Kukurbo de la serpentoj (*Trichosanthes cucumerina*) kaj hordeo. Tiu ĉi eltrovaĵo reprezentas la plej antikvan pruvon de loka, pripensita, biero-produktado en Ĉinio!

Ni revenu al Eŭropo, precipe al ties orientaj partoj, Rusio, Baltio kaj Balkanio. Ĉu ankaŭ tie ekzistas iaj malnovegaj kaj precipe neordinaraj biertipoj? Bonŝancon mi havis dum iu vizito al Litovio, kie - unuafoje en mia vivo - oni regalis min per biero, la fama **Kvaso** [kvass], kiun neniam antaŭe mi havis la eblon gustumi.

Kvass, vorto slavdevena, estas biero je malalta fermentado kies baza elemento estas la sekala pano, nigra aŭ bruneta. La nigra pano transigas al la trinkaĵo apartan koloron, malhelan kaj malklaran: ĝia alkohol-gradeco estas tre malalta, ĉ. 1 grado.

Longan historion ĝi havas malantaŭ si. En Mezepoko la malriĉaj familioj kutimis konsumi ĉi trinkaĵon kaj ankaŭ ĝin utiligi en kuirejo. Malnovaj fontoj ĝin citas jam en la 10ª jarcento:



ĝi estis tre multe uzata ankaŭ dum la regado de Caro Pietro la Granda. En la postaj jarcentoj kamparanoj, monaĥoj kaj la sociaj klasoj plej mizeraj daŭrigis tiun produktadon, ĝis kiam, en pli proksimaj tempoj, oni komencis industrian faradon de kvaso, kiu nun estas eksportata la tutan jaron ankaŭ al eksterlando.

Post tiu ĉi enkonduko, ĉu oni ne eksentas la deziron provi mem produkti hejme tiun bongustan trinkaĵon?

Jen por vi unu el la plej simplaj receptoj: mi atendas scivoleme, ĉu sukcesis la eksperi-

---

de la admiralo estas ĉi tie skribita fonetike kaj mise, ĉar uzata de neklera homo.

4. galioto = Ĉe kroatoj kaj italoj (ne en PIV!) ĝi signifas homon kiu remas sur galero, ofte sklavon. Ĉi tie ankaŭ: malbonega homo.

5. "Ev-ev-iv-a I-ta-li-a"= "Vivu Italio!" (Itale korekte: *Evviva l' Italia*!).

6. Amiraljo = admiralo. Vorto nekorekte uzita de neklera homo.

7. ĉozoto = pejorativa vorto en iuj ĉemaraj regionoj de Kroatio. Signifo: italo (aŭ italaĉo). La vorto devenas de la itala urbo Chioggia (kjoĝa).

8. Krasno = pilgrima loko en la kroata montaro Velebit. Sanktejo de Dipatrino.

Palma oleo

Ne plu en niaj teleroj la tropika graso sed en la motoroj de niaj aŭtomobiloj

Espereble la kutimaj legantoj de ĉi Bulteno ankoraŭ memoras la aperintajn artikolojn pri la danĝeroj de uzado de palma oleo. Tiajn informojn mi rajtis - kaj rajtas - publikigi post la skribita interkonsento pri ilia esperantigo kaj utiligado fare de la direkcio de *Il Fatto Alimentare*[1] www.ilfattoalimentare.it, kiu jam de dek jaroj tre aktive kaj kun scienca fundamento okupiĝas pri problemoj rilate nutradon.

Praktike finfine malperis de la superbazara bretaro, sed ne de niaj vivoj kaj de … niaj aŭtomobiloj. Fakte palmoleo daŭre estas konsumata, en grandegaj kvantoj, por produktado de biokarburaĵoj disponigitaj al transportaj kaj energiproduktaj sektoroj. Legindas la dosiero de *Legambiente* (Medio-Ligo): "Pli da palmoleo en motoroj ol en biskvitoj", bazita sur referaĵo je eŭropa nivelo de ONG por daŭrigebla disvolviĝo. El tio rezultas, ke la ĉerpado de palma oleo por energidonaj celoj, ekz. en Italio, atingis la kvanton da 840 tunoj en 2019. Tamen Medio-Ligo klarigas, ke se sur la ujoj de nutroproduktoj, aŭ purigaj substancoj aŭ kosmetikaĵoj klare estas indikitaj la enmetitaj substancoj, la distribuantoj de karburaĵoj aŭ produktantoj de elektra energio kiuj bruligas palmoleon, tute tenas kaŝitaj tiujn informojn. Konklude, 70 procentoj da palma oleo, enportitaj Italujen, estas uzataj por produkti biokarburaĵojn kaj elektran energion.



Kaj fine, kio plej atentindas kaj gravas, la italaj aŭtomobilistoj pagis, en 2019, 300 milionojn da eŭroj por la palmoleo en la biodizelpetrolo. Konsumantoj kaj industrioj, pagante la elektrofakturon, elspezas ekstran kvoton por derivaĵoj el la palmo- kaj sojo-oleoj (ambaŭ kaŭzantaj senarbarigadon!), kaj tio egalas entute al ĉ. 900 milionoj da eŭroj. [*ndr: laŭ statistiko de Medio-Ligo bazita sur la donitaĵoj de Institucio pri energiodonaj servoj*]



La plej pensiga kaj malsolvebla problemo ĉikampa estas, ke en la transporta sektoro la eŭropa direktivo ne fiksis taŭgajn kaj koherajn kriteriojn rilate la krudajn materialojn, tiel ke komercado de palma kaj soja oleoj, kies tuja evidenta konsekvenco estas la senforstigado, plue ekzistados ĝis la 2030[aj] jaroj. Tio ĉi estos la kaŭzo, pro kio la italia kvoto pliiĝos ĝis 70 procentoj – por liveri la biokarburaĵojn.

Jen interesa statistiko farita en 2019:

– italaj aŭtomobilistoj bruligis 22 fojojn pli da tropika graso, ol tiu utiligata de la firmao *Ferrero* (ĉu vi memoras *Nutella*?);

- 15 fojojn pli ol tiu de *Mondelēz International*, Usono, kiu aktivadas en la nutra sektoro, kaj okupiĝas pri diversaj manĝ(et)o-produktojn, antaŭe sub la marko *Krafts Food*.

Ŝokis min la longa listo de produktoj kontrolataj de tiu multnacia koloso: *Fattorie Osella* (Farmoj Ozela – fromaĝoj); *Fonzies* (salitaj majz-manĝetoj); *Splendid* (kafo); Halls (sukeraĵaro); *Milka* (ĉokoladoj); *Mikado* (dolĉaĵetoj);

---

mento kaj ĉu vi ŝatis la bieron.

Por pretigi hejme Kvason, necesas:

500 g nigra sekala pano
4 litroj da akvo,
30 g da biergisto
200 g da kansukero
4 kuleroj da faruno,
1 salpinĉo
80 g da rosinoj
Raspita ŝelo kaj suko de 1 citrono
Iom da mento-folioj por aromigi.

Tranĉu la panon je porcioj kaj ilin sekigu en antaŭvarmigita forno je 160-grada temperaturo dum unu horo. Poste dispecetigu la tranĉaĵojn kaj ilin metu en grandan ujon: la tuton kovru per bolanta akvo. Surmetu tolaĵon kaj lasu ripozi dum 8 horoj. Filtru per kribrilo, konservu la akvon, post dispremado de la pano, kiun vi forĵetos. Intertempe miksu la diserigitan giston en kvar kuleroj da varmeta akvo sukerigita (unu kulero da sukero), aldonu la farunon kaj ripozigu 20 minutojn. Poste enmetu la panakvon kune kun la sukero kaj salo. Verŝu en ĉiun botelon la likvon, rosinojn, citronan sukon kaj menton: fermu ilin per plasta folieto fiksita per elastaĵo kaj lasu fermentigi dum unu semajno. Fine malŝtopu, filtru la enhavon, forigu la rosinojn kaj rekrementojn kaj ree enboteligu.

Post unu semajno la biero pretos por esti gustumita! Je via sano! *ElDo*

Noto 1 - Cirkula ekonomio estas ekonomia sistemo planizita por reutiligi materialojn dum sekvaj profitodonaj cikloj, maksimume limigante malŝparojn.

Saiwa (biskvitoj, krakenoj ks); *Vitasnella* (diverstipaj trinkaĵoj) kaj multaj kaj multaj aliaj tre bone konataj, almenaŭ en Italio.

La fina nekredebla kaj timiga rezulto estas, ke 4,5 milionoj da tunoj de palmoleo (el tiuj 584 miloj nur en Italio) elvaporiĝis, en la vera senco de la vorto kaj kun tiuj ankaŭ la tropikaj arbaregoj, ĉefe la Indoneziaj kaj Malajziaj, kie situas la plej grandaj plantejoj el la tuta mondo, kiuj vidis en la lastaj 20 jaroj, inerte kaj senpove, la malaperon de 33 milionoj da hektaroj de forstoj kaj torfejoj.

Kia katastrofo por la kompatindaj indiĝenoj forigitaj de iliaj vilaĝoj, kia katastrofo por la naturo kaj kia katastrofo por la senkonscia kaj senscia homaro!

Medio-Ligo jam lanĉis petskribon por peti Italion ne atendi la jaron 2030[an] sed tuj elimini la palmoleon de la biokarburaĵoj, kaj krome malpermesi ankaŭ la utiligadon de soja oleo, por kies produktado oni estas senarbariganta Sudamerikon!

Eblas ankoraŭ subskribi la peticion: kion vi atendas?

Adaptis kaj traduktis: ElDo
http://ilfatto alimentare.it

Noto 1

Il Fatto Alimentare *estas reta tagĵurnalo, kiu komencis siajn publikaĵojn la 16[an] de junio 2010. La ttt-ejo aperigas artikolojn pri nutrotemoj koncerne la sekurecon, etikedojn, nutradon, analizon de produktoj, krom fundan pristudadon rilate al kostoj, konsumoj, tiurilata leĝaro....*
Oni evidentigas en la etikedoj la ĝuste konformajn surskribojn kaj komparas la ecojn de la produktaĵoj. En la retejo estas spaco ankaŭ por komparaj testoj italaj kaj alilandaj.
Krom ĉi artikoloj, ĉeestas sekcio por dokumentoj prilaboritaj de agentejoj zorgantaj pri nutrosekureco (EFSA, FDA, ANSES…) kaj de italaj institucioj (ISS, CREA…). En la sektoro pri propagando oni ekzamenas la verdiktojn de Antitrust (= aro da juraj reguloj kiuj celas la kreadon kaj daŭrigon de justaj kondiĉoj por la ekonomia konkurenco inter la entreprenoj agantaj sur la merkato)*, de Itala Instituto pri memdisciplino en reklamado (IAP) kaj de aliaj eŭropaj organoj.*
Ĉiutage estas ĝisdatigita la listo de nutraĵoj kiujn oni devas elimini de la bretaroj de superbazaroj, kun klarigo de la kialoj.
La redakcio konsistas el profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj. La kunlaborantoj estas fakuloj plej diversaj: advokatoj pri nutro-rajto, nutradscienculoj, universitataj docentoj, sciencaj esploristoj ....
La retejo ne havas eldoniston kaj neniam ricevis publikan financadon. La mondonacoj de la legantaro - en 2018 - kovris nur la 15 procentojn de la elspezoj.

Aforismo

Se la popoloj pli bone ekkonus unu la alian, ili lernus sin malami - *Ennio Flaiano, verkisto (1920-72)*

4-a LITERATURA TRADUKKONKURSO "LUCIJA BORČIĆ"

POEZIO: maksimuma longo ne fiksita

PROZO: rakonto aŭ novelo; maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj)

Limdato: 14[-a] de septembro 2020

Internacia Literatura TradukKonkurso, de iu ajn nacia lingvo al Esperanto, honore al LUCIJA BORČIĆ (26.07.1921-14.11.2015), zorge de KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO.

La rezultojn oni publike anoncos la **14[-an] de novembro en Zagrebo**, okaze de la 5[-a] Memorkunveno "LUCIJA BORČIĆ".

La organizantoj disdonos ĝis tri premioj ĉiubranĉe. Ili konsistos el diplomo kaj libro. La aliro al la konkurso estas libera por ĉiu Esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj, neniam antaŭe publikigitaj, ĉu en presa, reta, bloga, fejsbuka formoj. Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn: personan kaj familian nomojn, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto; titolon de la originalo, personan kaj familian nomojn kaj bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso:

hes.keu@gmail.com.

La organizantoj de la konkurso prizorgos la pres-adon de la premiitaj tradukoj konforme al la reguloj preskribitaj por tiu agado (respekto de aŭtoraj rajtoj ktp).

★ ★ ★ ★ ★ ★

INTERNACIA FOTO-KONKURSO

POR ESPERANTISTOJ "KROATIO DE VIA OKULO"

Oni povas sendi fotojn faritajn en Kroatio, iam ajn.

Limdato: 15[-a] de septembro 2020

Ĉu vi jam vizitis Kroation?
Ĉu vi havas iun interesan foton?
Ĉu vi ŝatas kundividi ĝin kaj eble eĉ gajni premion?
Se la respondoj estas JES, nepre partoprenu la konkurson!
Vi povas sendi maksimume 5 (kvin) fotojn kiujn vi fotis IAM AJN en Kroatio! Do, ankaŭ malnovaj fotoj bonvenas!
Por ĉiu foto bv. aldoni la lokon kaj daton (almenaŭ jaron, se vi ne rememoras precize!)

Nur gravas, ke la fotoj estu VIAJ!

Rezultoj kaj Ekspozicio okaze de la
5[-a] Memorialo "LUCIJA BORČIĆ"
(Zagrebo, 14.11.2020)

INTERESA INTERŜANĜO DE IDEOJ

Ĉu la cifereca diplomatio sufiĉas?

En la maja monato okazis en la ĉefa slovena gazeto *DELO* interesa interŝanĝo de opinioj, kiu povas interesi ankaŭ niajn alilandajn geamikojn: ĉi-sube mallonga resumo.

Opiniojn interŝanĝis la prezidanto de Respubliko Slovenio, s-ro Borut PAHOR, kaj nia membro Janez ZADRAVEC. Temis pri la lingva demokratio kaj Esperanto.

Nome, prezidanto PAHOR, okaze de la virusa pandemio, sendis al la ŝtatestroj de Italio, Hispanio kaj Francio esprimojn de subteno kaj solidareco en iliaj naciaj ŝtatlingvoj (patrinaj lingvoj). J.Z. tuj reagis kaj lin publike demandis pri la ebla uzo de Esperanto. Krome li aldonis, laŭ kiuj kriterioj li elektis nur tiujn lingvojn (kriterioj de ŝtatlingvoj, de Eŭropa unio, de Unuiĝintaj nacioj...). Plie li starigis demandon pri la lingva demokratio en la internacia kunlaboro kaj aparte ebleco de egalrajta komunikado de civila socio.

Aperis nekutime rapida publika respondo (post tri tagoj!) per kio prezidanto PAHOR deziris ĉion bonan al Esperanto, sed ke li havas pripensojn pri la ebleco, ke Esperanto havu teknikan aŭ eĉ oficialan rolon en la Eŭropa unio. Krome li klarigis, ke li sendis mesaĝojn al ĉiuj prezidantoj de la ŝtatoj en EU en ĉiuj iliaj 24 naciaj lingvoj. Tion ĉi li, konklude, nomis *cifereca diplomatio*, kiu ebligas estimon kaj egalrajtan komunikon.

J.Z. en la respondo klarigis pri la deveno kaj karakterizoj de Esperanto kaj akcentis, ke ĝi ĉiam prezentiĝas kiel dua lingvo por ĉiuj homoj ĝuste pro la estimo al ĉiuj naciaj lingvoj kaj aliflanke ebleco de egalrajta komunikado. Fine la virusa pandemio bedaŭrinde atakis pli ol cent ŝtatojn kun centoj da diversaj naciaj lingvoj. Je la fino li proponis, ke la prezidanto kunvoku publikan interkonsiliĝon (kiujn li ofte praktikas) por interŝanĝi la opiniojn pri la IL-o Esperanto en la ŝtata lingva politiko. Nome, en la ŝtata dokumento de la Ministerio pri kulturo *Nacia programo de la lingva politiko* estis jam konkrete menciita la rilato de ILE kun la lerneja sistemo de fremdaj lingvoj kaj kun komunikado en EU.

Krome por la nepraj reformoj en la EU, kiuj rilatos ankaŭ kunlaboron de civila publiko, cifereca diplomatio ne sufiĉas nek taŭgas.

Tiusence li atentigis pri la principoj skribitaj en la *Ĝenerala Deklaro pri la homaj rajtoj* de UN.

Resume: gravas ligiteco inter la vortoj 'lingva demokratio' kaj 'ILE'; ni havas la saman opinion de la ŝtatprezidanto: Esperanto estis denove rimarkebla!

Janez ZADRAVEC

SLOVENA ESPERANTO-LIGO

NDR: *gratulojn al la amiko Janez pro liaj rapida reago kaj taŭgaj respondoj!*

Septembra Programo	
18a, vendredo	20h00 - Esperanto-filmetoj
25a, vendredo	20h00 - Prezento de la libreto pri **FESTO DE KULTUROJ 2020**



Oktobra Programo	
2a, vendredo	20h00 - Kune ni pretigu programon ĝis la fino de la jaro
5a, lundo	14h50 - RAIUNO - Piloloj.0 pri la internacia lingvo Esperanto
6a, mardo	18h00 - Prezento de la unuagrada kurso okt '20-majo '21
9a, vendredo	20h00 - Esperanto-filmetoj
13a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
16a, vendredo	20h00 - El la libro HOMARANO de Aleksander KORĴENKOV
20a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
23a, vendredo	20h00 - El Esperanto-ĵurnaloj
27a, mardo	18h00 - Duagrada kurso
30a, vendredo	20h00 - Fotoj el nia pasinteco

BULTENO DE TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org